# INSTRUISTA TREJNADO
# en la kunlaboro de la Interlingvistikaj Studoj de UAM, ILEI kaj Edukado.net

La Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando) kaj ILEI denove kune organizas unujaran **instruistan trejnadon**, kiu disponigas la bazajn konojn necesajn por instruado de esperanto kaj trejnos la partoprenantojn pri metodiko.

La kursaro necesigas partoprenon dufoje en la surloka intensa semajna sesio (la unua okazos 17-23.09.2016, la dua 04-10.02.2017) kaj intertempan hejman laboradon, retajn taskojn kaj konsultiĝon kun la kursgvidantoj kaj fine pretigon de laboraĵo pri metodika temo, kies prezento kun la fina ekzameno okazos en septembro 2017. Aliĝantoj ricevos ILEI-diplomon pri instruista trejnado.

**Kondiĉoj**: bona lingvoscio (min. B2, atestilo pri esperanto-ekzameno estas bonvena) kaj baza kono de esperanta kulturo, krome finita mezgrada lernado (tipo de abiturienta ekzameno).

**Partoprenkotizo**: A-landoj: 300 EUR, B-landoj 130 EUR por unu semestro. ILEI-UEA ofertas 4 stipendiojn.

Informo kaj aliĝo: interlin@amu.edu.pl aŭ ikoutny@amu.edu.pl.
http://www.amu.edu.pl/~interl/

---

## El la Programo

**Lingvopedagogio** (Katalin Kováts, Zsófia Kóródy, Duncan Charters, Ilona Koutny):

Bazaj faktoroj de lingvopedagogio (instrumetodoj, instrupocezo, evoluigo de kapabloj, taksado, lingva interfero, ktp.)
Esperanta metodiko (instruado de elparolo, gramatiko, vortoprovizo kaj kulturo, planado de lecionoj kaj kursoj, ktp.)
Instruhelpiloj (de instruista kofro tra eldonaĵoj, filmoj ĝis retkursoj)

**Esperanta kulturo** (Tomasz Chmielik, István Ertl, Aleksander Korĵenkov, Ilona Koutny):

Plej gravaj eventoj de la historio de esperanto
Ĉefaj periodoj kaj verkistoj de e-literaturo
Tiklaj punktoj de e-gramatiko

**Lingva trejnado** (per testoj)

**Donaco**: partopreno en la aktualaj kursoj de la Interlingvistikaj Studoj (i.a. Renato Corsetti pri e-movado, Probal Dasgupta pri literaturo).